Dalam berkomunikasi, kita harus memperhatikan hal tersebut untuk bisa mengerti orang lain. Bahkan jika dua orang menggunakan bahasa yang sama, cara mengungkapkan suatu hal yang sama bisa sangat berbeda jauh antara mereka.

Esperanto adalah bahasa yang secara khusus diciptakan untuk komunikasi internasional. Hal ini bukan berarti ada kompetisi antara Esperanto dengan bahasa lain, sebagaimana halnya PBB menunjuk enam bahasa resmi, dan bukan berarti enam bahasa tersebut harus berkompetisi satu sama lain untuk menjadi satu-satunya bahasa internasional.

Semua bahasa berhak menjadi bahasa internasional. Menurut saya itu tergantung pada kebutuhan pengguna dan kemudahan bahasa tersebut. Dalam hal tata bahasa, Esperanto termasuk paling mudah. Untuk mempelajarinya, tidak perlu waktu selama seperti mempelajari bahasa lain. Cobalah pelajari selama satu sampai duabelas minggu. Jika anda merasakan manfaat darinya, lanjutkan. Jika tidak, anda bisa berhenti kapan saja.

Teddy Nee
www.neeslanguageblog.com

Kial Vi Ne Lernas Esperanton?

*Multaj lingvoj sur la Ter',
ĉiu ili kiel sabler'.
Se vi volas regi ĉion,
kial vi ne lernas Esperanton?*

*Angla havas tro multajn malkonsekvencojn,
franca havas tro multajn nazvoĉojn.
Se vi volas lerni facilan lingvon,
kial vi ne lernas Esperanton?*

*En la mondo ĉiama evolua,
bezonata estas la lingvo unuiĝa.
Se vi volas teni la mondon
kial vi ne lernas Esperanton?*

*Esperanto estas nova sento,
per ĝi unuiĝas la homaro.
Se ĝi havas facilan gramatikon,
kial vi ne lernas Esperanton?*

*Esperanto estas forteco mia,
kaj ankau por mondo tuta.
Se ĝi ja donos novan sperton,
kial vi ne lernas Esperanton?*

*Ne malŝparu la tempon,
ne pensu la problemon,
ne aŭdu homan mokon,
ni lernu Esperanton!*

de Eko Nur Syah H.

Eckart Loewe, Volontulo Helpanta Instruadon en Montregiono de Ĉinio

En la okuloj de la vilaĝanoj li estas strangulo, kiu ne manĝas viandon, nek drinkas, nek uzas lernolibrojn dum la instruado, kaj eĉ ne postulas pagon. En la okuloj de la geknaboj li estas ilia plej bona amiko, instruisto kaj kunludanto, kiu povas kune kun ili grimpi sur arbon kaj sin ruli sur la tero.



Ŝajnas al multaj homoj, ke li estas bonkorulo, kiu venis al Ĉinio de tre malproksima lando por helpi la instruadon en izolita montregiono, kaj eĉ ilia idolo li nun estas. Li mem opinias, ke li estas ordinara kiel aliaj homoj kaj li nur faris tion, kion li ŝatas fari.

Lia nomo estas Eckart Loewe, volontulo el Germanio, kiu senpage instruas en la montregiono de Guanĝi, Ĉinio, por pli ol 10 jaroj.

En la montvilaĝo aperis fremdlandano

En julio de 2001 fremdlandano kun la blondaj haroj kaj la bluaj okuloj montris sin en la vilaĝo Linguangtun en la gubernio Donglan de la Guanĝi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono en sudokcidenta Ĉinio. Tie li luis domon kun la monata luprezo de 10 juanoj kaj komencis instrui al geknaboj, kiuj ne povis viziti lernejon. Tiam en la vilaĝo ne estis telefono, nek aŭtovojo, kaj plej multe da lokanoj parolis nur dialekton de ĝuang-nacio. Ŝajnis al la vilaĝanoj, ke tiu fremdlandano estas tre stranga. Ĉar anstataŭ vivi en sia lando li venis al la ĉina vilaĝo por fari senpagan instruadon. Kelkajn tagojn post lia alveno la vilaĝanoj sciis, ke la strangulo nomiĝas Eckart Loewe, germano, kaj ke li ne manĝas viandon, nek drinkas, nek fumas, nek vetas.

Estis nekredible por la vilaĝanoj, ke iu fremdlandano memvole alvenus en la montvilaĝon por senpage doni lecionojn al lokaj geknaboj. Nur tre malmultaj ĉinoj voluntas labori ĉi tie kiel instruistoj eĉ salajrate. Kaj tamen tiu ĉi fremdlandano ne postulas pagon por sia laboro. Kion li povos fari ĉi tie?

Informiĝinte, ke Eckart Loewe senpage donos lecionojn, dekkelkaj geknaboj sin anoncis por lerni

de li. Inter ili escepte de unu knabo, kiu iam lernis en la elementa lernejo por unu jaro, aliaj neniam vizitis lernejon. Antaŭ leciono, Eckart Loewe konigis al la gepatroj de la geknaboj, ke lia celo estas klerigi la geknabojn kaj ne estas por funkciigi lernejon; la geknaboj ne povos ricevi diplomon post la finlernado kaj li ne postulos lernokotizon.

Komence la vilaĝanoj ne aprobis la instruan manieron de Eckart Loewe, ĉar dum la instruado li ne uzis lernolibrojn kaj, anstataŭ stari sur la podio li sidis kune kun geknaboj. Ili opiniis, ke tio ne estas kutima instrumano en la normala lernejo.

La alveno de Eckart Loewe ŝanĝis la ideojn de la lernantoj kaj ankaŭ la tutan vilaĝon. Por havigi al la vilaĝo cementitan vojon la vilaĝanoj intencis peti pere de Eckart Loewe kapitalon al la gubernia registaro. Anstataŭ tio Eckart Loewe gvidis lernantojn mem konstrui la vojon. Li postulis ilin mem fari desegnaĵojn, modelojn kaj eksperimentojn por la konstruado. Komence la lernantoj opiniis, ke tio estas nur ludo, sed ne lernado kaj iliaj projektoj estos neuzebaj. Poste, ili iom post iom konsciis, ke la celo estas realigebla per ilia propra penado. Ili mem kalkulis, ekzemple, kiom da cemento kaj sablo oni bezonas por konstrui la vojon kaj kiom da cemento kaj sablo ĉiu lernanto devas porti. Post la finpretigo de la projekto ankaŭ la vilaĝanoj partoprenis en la konstrua laboro. Post nelonge la cementa vojo kun larĝeco de ĉirkaŭ unu metro kaj longeco de ĉirkaŭ 300 metroj estis finkonstruita. De tiam la vilaĝanoj ne plu bezonis iri sur la kota vojo en pluvaj tagoj.

En la okuloj de la vilaĝanoj Eckart Loewe estas germana strangulo sed samtempe bonkorulo. Li venis al Ĉinio por helpi ĉinan edukadon. Ĉiuj, ĉu maljunuloj aŭ infanoj, en la vilaĝo nomas lin "instruisto Loewe". Multaj homoj opinias, ke Eckart Loewe disvastigas kvalito-orientitan edukadon en malgranda vilaĝo de Ĉinio. Pri tio li diris: "Mi ne scias, kio estas kvalito-orientita edukado. Mi scias nur, ke oni devas eduki geknabojn ke ili povu trovi

sian talenton kaj trovi ankaŭ, kio estas bezonata de la ĉirkaŭaĵo kaj kio estas bezonata de ili mem, kaj instrui al ili mem pripensi kaj solvi problemojn."

Li nur volas fari aferon, kiun li ŝatas

Dum la pasintaj 10 jaroj li ĉiamaniere evitis raportistojn. Kiam li eksciis, ke raportistoj venos intervjui lin, li sin kaŝis en hejmo de lernanto kaj nur post ilia foriro li revenis al la lernejo. Li diris: "Amaskomunikiloj faros min famulo. Mi nur volas bone fari mian aferon kaj ne volas fariĝi famulo. Famo nur povus ĝeni miajn laboron kaj vivon."

En la jaro 2012 Eckart Loewe unuafoje akceptis intervjuon de la Ĉina Centra Televida Stacio. Tiam li malkaŝis al la raportisto: "Mia amiko diris al mi, ke la eksa prezidento de Sud-Afriko Nelson Mandela foje diris (proksimume): 'Se vi kaŝus vin kaj ne konigus al aliaj homoj kiel vi faras vian ŝatatan laboron, aliaj opinius, ke ion tian ili tute ne povus fari. Se vi konigus al ili tian kion vi faras, ili povus kompreni, ke ĉiu homo povas fari aferon taŭgan por si mem kaj ŝatata de si mem.' Mi estis impresita de liaj vortoj kaj pro tio decidis akcepti la intervjuon."

Poste la raportisto sciigis al Eckart Loewe, ke multaj ĉinoj estis emociitaj de lia rakonto post prezentiĝo de la televida programo. Pri tio Eckart Loewe respondis: "Mi timas emocii aliajn homojn. En la jaro 2006, kiam mi aŭdis, ke mi estis rekomendita kiel kandidato por tiu-jara premio por



"personoj, kiuj emocias Ĉinion", mi ege maltrankviliĝis kaj tuj sendis mesaĝon al la juĝkomitato kun la peto, ke ĝi ne elektu min ĉar mi ne deziras emocii Ĉinion, kaj mi povas esti nur emociita de Ĉinio." Kiam aliaj laŭdis lin, li ĉiam sentis ĝenatecon kaj

diris: "La homo, kiun ili laŭdis, ne estas Eckart Loewe, kaj ne rilatas al mi."

Eckart Loewe adalah seorang guru sukarelawan dari Jerman. Ia telah mengajar di pedalaman pegunungan Cina, tempat yang tidak memiliki sambungan telepon atau kendaraan bermotor, selama sepuluh tahun. Saat awal datang, orang memandangnya agak aneh. Ia pirang, tidak memakan daging, minum minuman keras, merokok ataupun berjudi. Ada pula yang curiga, karena jarang ada orang, bahkan dari Cina sendiri, yang mau sukarela mengajar tanpa dibayar. Cara mengajarnya pun mereka bilang aneh. Dia tidak berdiri di mimbar atau menggunakan buku yang harus dipakai murid-murid. Namun setelah beberapa lama, masyarakat di pegunungan Guang-Zhi itu melihat ketulusan hatinya mencerdaskan anak-anak di sana dan jatuh cinta kepadanya. Ia akhirnya diwawancarai sebuah stasiun televisi Cina, dan mempengaruhi sentimen emosional warga negara itu dengan apa yang ia katakan dan lakukan.

Wang Na

www.espero.com.cn

Membrigu!

Aliĝu!

Kontribu!

INDONEZIA

ESPERANTO

ASOCIATO

Keanggotaan IEA terbuka bagi semua rakyat Indonesia. Yang penting Anda yakin akan pentingnya sebuah bahasa internasional yang mudah dipakai dan mendukung penyebarannya. IEA juga mengundang klub-klub Esperanto yang hendak bekerja sama atau mengikuti kegiatan yang ada. Hubungi pengurus IEA melalui estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com. Biaya keanggotaan tahun 2014 adalah Rp 100.000,00 bagi pelajar dan pensiunan, serta Rp 150.000,00 bagi yang lainnya, yang dapat dibayarkan melalui Bank Mandiri a/n Sondang I.S.D., no. rek. 070-00-04789801-8.

Membreco en IEA estas malferma al ĉiu indoneziano. Sufiĉas, ke vi kredu je la graveco de utila internacia lingvo, Esperanto kaj ĝia disvastiĝo tra la lando. IEA ankaŭ bonvenigas klubojn kiuj volas iĝi sekcio de IEA. Se tio interesigas vin, kontaktu la estraron ĉe estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com.

La membrokotiĝo estas Rp 100.000,00 por studentoj, senlaboruloj, kaj pensiuloj, kaj Rp 150.000,00 por aliaj. La kотиzo estas pagebla tra Bank Mandiri, nome Sondang I.S.D., no. 070-00-04789801-8.

Islamo en Pekino:**Homoj, Faktoj kaj Inspiro - fontoj**

Interparolo kun Ibrahim (Xuē Tiānlǐ), imamo de la pekinaj islamanoj

Akompanata de mia koleginino Revon (kiun mi sincere dankas por ŝia utiliga helpo kiel interpretistino) mi veturis al la moskeo de Niujie, kiun mi ofte vizitas, por konatiĝi kun la imamo kaj ekscii de li iom da historio pri aferoj laŭ mi intereseĝaj. Jen la kerno de nia renkonto.

Kie vi naskiĝis? Kiam kaj kial vi elektis fariĝi imamo? Kia estas via ĉiutaga vivo kaj laboro en la moskeo?

Mi naskiĝis en Panggezhuang de la distrikto (antaŭe estis gubernio) Daŝing de Pekino. Ĉiuj vilaĝanoj tie estas hujoj. Post kiam mi forlasis la elementan lernejon, mi lernis en la preĝejo, la vilaĝa moskeo. Oni klerigas ahonon en ilia knabeco, la aĝo por eniĝi en elementa lernejo. Komence mi lernis arabajn literojn kaj sekve tiujn de la persaj (la ĉefa lingvo uzata en la islama rito estas la araba). Mi laŭvice lernis la koncernajn librojn kaj pli kaj pli profundiĝis. Post la lernado de la "5 libretoj" mi serioze lernis la araban lingvon, ĉar la Korano estis skribita en tiu lingvo. Mi volis fariĝi ahono, ĉar la vilaĝo kaj la lokaj muzulmanoj havis tiun ĉi bezonon. Ne kiel nun, oni speciale starigis institucion por kulturaj ahonoj. En la pasinteco, nur en la preĝejo, la ahono gvidis kelkajn junajn disĉiplojn. (Li donis ekzemplojn pri la libroj de glosaro, verkado ktp). Fininte lerni la 13 librojn, mi akiris la verdan robon kaj fariĝis ahono. Post la "diplomiĝo", mi estis invitita de pluraj preĝejoj unu post alia (la invito okazas en ĉiu tria jaro) kaj komencis eduki lernantojn kiel ahonoj. Ahonoj estas "fluantaj", ili ne ĉiam restas en unu loko, ĉar ekzistas multaj nature formiĝintaj islamaj vilaĝoj kaj ili bezonas ahonojn. Post longa tempo, mi fariĝis la plej aĝa ahono. Nun, en Ĉinio estas institucio de islamaj asocioj (tutlanda kaj lokaj), ili klerigas ahonojn. Almenaŭ en Pekino, la ahonoj studis en la institucioj, dume la islamanoj de kelkaj aliaj lokoj daŭrigas la tradiciajn edukajn ma-



Ibrahim, la imamo, kun mi

nerojn de ahonoj. Pekino havas 140 ahonojn en pli ol 70 preĝejoj (kelkaj iris aliloken), plejpartaj ahonoj diplomiĝis en la institucio (ekde la jaro 1982), kaj mi estas la estro de la institucio (samtempe la estro de la Pekina Islama Asocio).

Kiom da islamanoj (ĉinoj kaj eksterlandanoj) loĝas en Pekino?

260 miloj, krome, ankaŭ alilandaj islamanoj. Ili same preĝas ĉiutage.

Ĉu ili nur iras al ĉi tiu moskeo?

Ne, ili laŭplaĉe vizitas. Normale, ili volas viziti tiujn pli grandajn preĝejojn, ekzemple la moskeon de Dongsipailou kaj aliajn. Same nia moskeo... Ni akceptis la ŝtatestrojn de Indonezio, Pakistano, Irano kaj tiel plu. Ĉar ĉi tiu preĝejo havas la plej longan historion en Pekino, ĝi stariĝis antaŭ pli ol mil jaroj.

Ĉu la islam-kredantoj en Pekino vizitas la moskeojn (tiun de Niujie kaj la aliajn) regule?

Certe, ni, islamanoj, devas konservi tempon por fari tion. Muzulmanoj ĉiam loĝas ĉirkaŭ la preĝejo, precipe en la naciminoritataj urbopartoj. Se en iu loko estas moskeo, certe ĉe ĝi proksime loĝas kredantoj. Mi vizitis multajn moskeojn, kiel ahono aŭ kiel lernanto.

Ĉu pli da moskeoj devus esti konstruitaj? Pli da "halal-nutraĵoj" (manĝaĵoj preparitaj laŭ la islama tradicio) devus esti troveblaj en la urbo?

Laŭ mi ili jam sufiĉas por la pekinaj islamanoj, ĉar la preĝejoj jam distribuiĝas en ĉiuj distriktoj kaj gubernioj de Pekino. Ankaŭ en la pasinteco estis multaj moskeoj, precipe tie kie abunde loĝis naciminoritatoj, ekzemple Niujie kaj Dongsi... Kvankam ne ĉiuj preĝejoj estas tiel grandaj kiel la Niujie-a. Las-



La plej antikva moskeo en Pekino, Moskeo de Niujie

tatempe, en Doudian estis malfermita granda moskeo dum la ĉi-jara Bajramo (islama festo), oni pagis por ĝi 100 milionojn da juanoj. Ĝi estas la plej granda preĝejo, povas enteni en si milojn da preĝantoj.

Antaŭ la jaro 996, alvenis du eksterlandaj kleruloj por disvastigi nian religion, tiam la imperiestra kortego volis doni al ili altrangajn oficojn por reteni ilin, ili ne volis fariĝi oficistoj ĉar ili preferis plenumi siajn devojn ĉi tie, do la preĝejo estis konstruita. Komence ĉi tiu moskeo estis tre malgranda -- se vi vizitos la antaŭan korton, vi povas vidi la sesangulan pavilonon, la "mil jaroj" ĝuste kuŝas tie. Jam multfoje oni rekonstruis la moskeon, sed neniu tuŝis ĝin. Ĝi estas samaĝa kiel la turo de la Liao-dinastio en la templo Tianning.

(Post iom da utilaj klarigoj li revenis al la demando...) Tre oportunas por la muzulmanoj akiri halal-ajn manĝaĵojn, ne nur en tiuj partoj de la urbo, kie jam de longe loĝas precipe naciminoritataj (Niujie, Dongcheng, Changying), sed ankaŭ en aliaj lokoj. Almenaŭ en Pekino, la metropolo, estas tre oportuna.

Ĉu la pekina registaro subtenas la moskeojn?

Grandegajn helpojn ĝi donis. Ekzemple la ĵus pasinta Bajramo, tiam 6 aŭ 7 miloj da islamanoj

preĝis samtempe en la moskeo, krome, 10 miloj da spektantoj vizitis Niujie... Tiom da homoj, tiom da sekurigaj aferoj... Antaŭ ĉio, nia administra distriktestro speciale okazigis grandan kunvenon por realigi kunagojn de policana, trafika, komerca kaj aliaj flankoj. La festivalo estas grava kaj internacia. Por ke ĉiuj bone pasigu la festivalon, la registaro plentforte donis helpojn homfortajn kaj materialajn. (Ekde 1949 la Registaro financadis plurajn projektojn por la riparo de la moskeo de Niujie. En 2005 la Registaro donis al la moskeo 25 milionoj da juanoj por la restaŭro de la moskeo. Tio permesis ankaŭ la rekonstruon de la preĝa halo por virinoj).

Ĉu la moskeo ofte okazigas aktivadojn? Kio ili estas?

Jes, certe, nur la regulaj religiaj agoj jam estas tre multaj, ĉiutage ni havas almenaŭ 50 preĝojn diversajn, inkluzive de ĵumuo (vendreda preĝo), namazo (ĉiutagaj preĝoj) kaj aliaj. Sen la subtenado de la registaro, estus tre malfacila por ni, neregistara unio, organizi tiajn aktivadojn.

Kian rolon havas la Asocio por la Islamo?

La rolo de la asocioj – tutlanda asocio kaj lokaj asocioj (kiel ĈEL kaj lokaj E-organizoj) – estas "administra oportuneco". Tiom da muzulmanoj



La minareto de la moskeo

muzulmanoj bezonas tiajn organizojn por plenumi religiajn taskojn. Ankaŭ ahonoj tiel servas por la islamanoj.

Ĉu la pekina islama komunumo aŭ la Moskeo de Niujie havas rilatojn kun islamaj komunumoj en aliaj landoj? Se jes pri kio? Kiaj projektoj?

Ne konkretaj komunikoj. Ni ne havas iujn organizojn por speciale fari tion. Pro tio, ke tiu ĉi loko (Niujie) havas longan historion por muzulmanoj, ni havas multajn ŝancojn akcepti delegaciojn eksterlandajn. Ekzemple, la eksterferaj departementoj kontaktos nin pro la vizito de iuj alilandaj gastoj, por ke ni faru preparojn kaj tiel plu...

Ekde pli ol 1000 jaroj Islamo estas realo de la ĉiutaga vivo en Pekino kaj en aliaj regionoj: kiaj estis la rilatoj inter islamanoj kaj ne islamanoj dum la historio?

En mia opinio, la rilatoj fakte estas tre harmoniaj, ne aperis gravaj konfliktoj inter nacioj. Kaj nun nia registaro havas naciajn kaj religiajn politikojn,

ĉiuj nacioj estas egalaj ĉu granda ĉu malgranda ĉu majoritata ĉu minoritata. Cetere la politiko klinas al la naciminoritatoj... Antaŭe, manĉuroj ne estis islamanoj, kaj nun eĉ koreoj, mongoloj kaj tibetanoj kredas islamon...preskaŭ en ĉiuj nacioj de Ĉinio estas muzulmanoj.

Ĉu oni rajtas en Pekino voki la kredantojn al la preĝo de la minaretoj per la kanto de la muezino? Se ne, ĉu tio iel ĝenas la harmonion de la kredantoj?

Oni rajtas. La kantoj certe estas samenhavaj kun tiuj de la aliaj islamaj landoj, sed en la arabaj landoj tia kanto estas iom pli laŭta.

Ĉu oni brodkastas la kanton? Aŭ voĉe krias?

Per homa gorĝo...por sciigi islamanojn jam tempo fari preĝon... Nun oni povas oportune scii la tempon, sed tia kanto certe devas resti, ĝi estas parto de la rito.

Pietro Fiocchi
www.espero.com.cn

Anonceto:


Respondante al invito de Australia Esperanto-Asocio por sendi nian reprezentantojn al sia kongreso kaj E-somera kurso en Kanbero, Januaro 2014, ni oficiale decidis, post konsideris kvin kandidatojn, kaj gratulas du elektitajn personojn:

- 1) Eko Nur Syah Hidayat de E-klubo en Ĝakarta*
- 2) 20 Andre Samosir de Yogyakarta*

Mi ne estas Fremdlandano, sed Zhenjiang - urbano

S-ro Michel Fontaine, naskita en Bourg-en-Bresse de la regiono Rhône-Alpes en la sudorienta parto de Francio, konatiĝis kun ĉina esperantisto Shi Xueqin, kies Esperanta nomo estas Neĝeta, antaŭ la 89-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Pekino en la jaro 2004. Poste, ili enamiĝis unu al la alia kaj geedziĝis en la jaro 2007.

Post la geedziĝo s-ro Michel Fontaine enloĝiĝis en Zhenjiang, urbon de la provinco Jiangsu en sudorienta Ĉinio, kie vivas Shi Xueqin. Komence s-ro Michel Fontaine sciis apenaŭ tiun ĉi urbon. Kaj iom post iom li ĝin ekamis profunde. Nun, li ĝin nomas "mia urbo".



Dank' al Esperanto ili geedziĝis

S-ino Shi Xueqin komencis lerni Esperanton en la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento. En la jaro 1991 ŝi perfektigis sian lingvon en E-kurso en Pekino dum 10 monatoj. Pro siaj pasio al Esperanto kaj diligenteo en la lernado, ŝi rapide progresis kaj multe altigis sian lingvan nivelon. Dank' al tio, ŝi fariĝis instruistino de la Esperanta kurso de la elementa lernejo de Baotalu en la urbo Zhenjiang.

En la jaro 2004 okazis en Pekino la 89-a Universala Kongreso de Esperanto, en kiu partoprenis pli ol 2 mil kongresanoj el pli ol 60 landoj kaj regionoj de la mondo. La kongreso bezonis grandan nombron da volontuloj, al tio sin anoncis Shi Xueqin. Dum la preparo de la kongreso, ŝi partoprenis en la laboro: respondi per Skajpo diversajn demandojn de la kongresanoj. Kiam ŝi unuafoje surretiĝis per Skajpo, ŝin salutis multaj samideanoj, el kiuj estis s-ro Michel Fontaine el Francio. Li rakontis al ŝi sian pasintaĵon en Prago kaj parolis al ŝi pri la Esperantaj kantoj, kiujn li ŝatas. Ili interparolis kun ĝojo en akordo.

Iom post iom Michel Fontaine kaj Shi Xueqin sentis, ke la babilado per Skajpo estas granda plezuro kaj poste fariĝis ia sopiro por ili ambaŭ.

Antaŭ ol emeritiĝo, s-ro Michel Fontaine funkciis kiel estro de la profesia licoo por malfacilaj geknaboj en la urbo Bourg en Bresse. Pro amo al infanoj kaj al edukaj aferoj, estas inter ili multaj komunaj paroltemoj kaj opinioj tre similaj pri samaj aferoj. Je tio, ili komprenis, ke la amikeco inter ili jam superis tiun inter ordinaraj amikoj.

S-ro Michel Fontaine kvankam ne sin anoncis al la 89-a Universala Kongreso de Esperanto, tamen li venis al Pekino por la kongreso. Li diris, ke li povas rekoni ŝin laŭ ŝia voĉo kvankam antaŭ tio ili neniam vidiĝis unu kun la alia. Dum la kongresa semajno Shi Xueqin laboris tage por la kongreso kaj post la laboro ŝi akompanis s-ron Michel Fontaine al

malgranda restoracio apud la kongresejo por babilo kaj manĝi ion.

Pri ilia amo s-ino Shi Xueqin havis sian propran maltrankvilecon: s-ro Michel Fontaine estas fremdlandano kun vivkutimo kaj kultura fono tute malsamaj ol la ŝiaj, kaj krome li estas multe pli aĝa ol ŝi. Kaj ŝi iam estis vundita pro malsukcesa geedzeco. Pro tio, ŝi estis tre hezitema, vizaĝe al s-ro Michel Fontaine. Dank' al la persvado de siaj amikoj kaj la subteno de siaj familianoj, ŝi fine decidis akcepti la amon de tiu ĉi franco. Sed ŝi diris al li, ke ŝi ne volus vivi en Francio post la geedziĝo. Do, s-ro Michel Fontaine, kiu profunde dronis en la amo, venis al Zhenjiang de Ĉinio en februaro de 2005, kaj pasigis tie sian unuan ĉinan Novjaron -- la Printempan Feston.

Eniro en la vivon de Zhenjiang-anoj

S-ro Michel Fontaine venis de Francio al la urbo Zhenjiang pro tio, ke lia ĉina edzino vivas tie. Enloĝiĝinte en tiun ĉi urbon, li profunde amas ĝin.

Krom senpage instrui la francan lingvon kaj Esperanton ĉiutage pere de interreto, s-ro Michel Fontaine preferas promeni surstrate. Gaja kaj vigla, li ĉiam kun rideto salutas ĉiun renkontiton konatan aŭ nekonatan per la ĉina lingvo. Kaj ĝuste pro tio, li

konatiĝis kun multaj loĝantoj de la malnova urbokvartalo. Najbare de ilia loĝejo funkcias budo por ripari biciklojn, kies mastro ĉiam salutas s-ron Michel Fontaine je la unua vido de malproksime: "Bonvenon, mia malnova amiko!" kaj tion sekvas la salutprocedo apartenanta al ili ambaŭ: la mastro de la budo stariĝas, tiras supren sian manikon por vidigi sian pojnnon, ke s-ro Michel Fontaine "manpremu" kun li. La manoj de la mastro estas plenaj de maŝin-oleo dum riparado de bicikloj kaj la purigado de ili estas komplika afero, do ili kreis tiun ĉi manieron por reciproki la saluton; kaj iu purigisto por la publika medio en la loĝkvartalo, kie loĝas la geedzoj, nepre demetas siajn gantojn por solene saluti al s-ro Michel Fontaine per varma manpremado je la renkontiĝo surstrate. Foje kaj foje oni trovas, ke s-ro Michel Fontaine interparolas kun iu alia per larĝaj gestoj kaj troigitaj mienoj pro lingvobaro. Kvankam li scias nur tre malmulte da ĉinaj vortoj, tamen la lingvobaro ne povas malhelpi lin en interŝanĝo kun Zhenjiang-anoj.

Najbare de ilia loĝejo funkcias vesto-vendejo, antaŭ ties pordo estas metitaj modeloj, pri tio li estas scivolema. Li diris, ke li neniam vidis la similan aranĝon. Ĉiu-foje kiam li venas al la loko, li kvazaŭ inspektanto alpaŝas kaj manpremas kun ĉiuj modeloj.

S-ro Michel Fontaine havas apartan ŝaton al la mil-jara pramejo Ŝiĝin bone konservata. Tie la lokaj tradiciaj folkloroj, nove riparitaj konstruaĵoj laŭ la antikva stilo, malgrandaj budoj por kukoj en loka gusto kaj tiel plu lin forte interesas. S-ino Shi Xueqin konigis, ke ĉiu-foje kiam ili hejmen revenas aŭ de Francio aŭ de aliaj lokoj post turismado, li ĉiam laŭte diras kun emocio: "Ah, mia urbo, mi revenas!"

S-ro Michel Fontaine amas la urbon Zhenjiang, sed foje li parolas ankaŭ pri ĝiaj malbonaj fenomenoj. Li ne povas toleri la jenajn du aferojn, t. e. la loka trafiko -- li opinias, ke oni devas redoni la trotuaron al la pasantoj; la alia -- la publika hiegeno: luj lokanoj laŭvole forĵetas sentaŭgaĵojn al la tero, tio malĝojigas lin. Sed li, same kiel multaj aliaj Zhenjiang-anoj, mem kritikis tiujn malbonaĵojn, sed ne ĝojas, kiam alilokanoj tion faras.

Kolizio de la kulturoj orienta kaj okcidenta

Pro malsamaj vivkutimoj kaj diferenca fono de la kulturoj orienta kaj okcidenta, kelkfoje ankaŭ ili ne komprenis unu la alian en la ĉiutaga vivo. S-ino Shi Xueqin malkovris, ke ŝia franca edzo plendis al ŝi post sia unua matenmanĝo en Ĉinio: "Ĉu vi scias, ke



La amantoj festante vivon

eĉ mankas kafo al mia matenmanĝo." Ŝi respondis al la edzo, ke ĉinoj trinkas plejparte teon, sed tre malofte kafon. Kaj li daŭrigis: "Mi prenas ankaŭ teon, sed ĝi estas varma kaj eĉ sen sukero."

Nuntempe, ili prenas okcidentan matenmanĝon el kafo, kukoj kaj fruktoj, ĉinan tagmanĝon el pladoj kaj supo. Kaj s-ro Michel Fontaine mem preparas la vespermanĝon el legom-supoj kaj ov-kuko. Sed post ĉiu manĝo li nepre elprenas sian trezoran skatolon por bombonoj kaj manĝas kelkajn pecojn.

S-ino Shi Xueqin kutimas kolekti objektojn, dum s-ro Michel Fontaine -- forigi neutilajn aĵojn. Laŭ li, tiuj kiujn oni ne uzas dum 2 jaroj devas esti forĵetitaj. Pro tio, li humure nomas sian edzinon per la aminda kromnomo "museto", ĉar tiu ĉi besto ŝatas kaŝi aĵojn.

Pro la profunda amo inter la geedzoj kaj ankaŭ pro la tolerema sinteno, ili ĝuas ĝojon kaj feliĉon en kolizio de la kulturoj orienta kaj okcidenta. Ni kore deziras al tiu ĉi franca Zhenjiang-ano gajan vivon en lia urbo ĉina kaj al ĉi tiuj esperantisto-geedzoj plenan feliĉon en la estonta vivo!

Michel Fontaine adalah seorang penutur Bahasa Esperanto dari Perancis yang bertemu penutur Esperanto Cina, Shi Xueqin, pada Kongres Dunia Bahasa Esperanto ke-89 di Beijing pada tahun 2004, yang diikuti oleh lebih dari 2000 orang dari lebih dari 60 negara. Mereka saling jatuh cinta dan menikah pada tahun 2007. Kemudian mereka tinggal di tempat asal Shi Xueqin, Zhen-jiang di daerah tenggara Cina.

*Hua Lei & Ding Weimin
www.espero.com.cn*

ESPERANTO EN INDONEZIO estas neregula bulteno por la indoneziaj esperantistoj kaj iliaj amikoj. Ĝin redaktas teamo de volontuloj kaj ĝi aperas danke al la kontribuoj de indoneziaj kaj alilandaj kunlaborantoj kaj al la donacemo de malavaraj subtenantoj. Nek la redaktantoj nek la kunlaborantoj ricevas ajnan rekompenco pro sia laboro. Al ĝi povas kontribui kiu ajn, se la kontribuajo konformas kun la celoj de la bulteno.

Por havi kiel eble plej kvalitan bultenon kaj por faciligi la laboron de la redaktantoj, ni petas niajn kunlaborantojn atente legi la sekvajn sugestojn/petojn kaj, laŭeble, sekvi ilin. Dankon!

- Akcepteblas tekstoj nur en Esperanto kaj la indonezia lingvo.
- Prefere verku nelongajn tekstojn en unu el la lingvoj menciitaj ĉi-supre kaj aldonu al ĝi resumon, maksimume centvortan, en la alia lingvo.
- Antaŭ ol sendi la tekstojn, nepre kontroligu ilin pere de aliaj (pli spertaj) kolegoj. Tio povas okazi kadre de Esperanta kunveno aŭ leciono, aŭ rete. La tekstoj estu kiel eble plej seneraraj kaj en bona stilo.
- Bonvolu sendi la tekstojn en unu el la jenaj formatoj: **.txt**, **.rtf**, **.odt**, **.doc**. Nur se vi ne povas sendi en unu el la ĉi-supraj formatoj, sendu en **.wpd** aŭ **.docx**. Ne sendu **.pdf**-dokumentojn!
- Se vi uzas surogaton por la Esperantaj literoj, uzu la saman por ĉiuj literoj de la dokumento.
- Uzu nur unu litertipon por unu dokumento.
- Se eblas, sendu ankaŭ bildojn, laŭeble altkvalitajn, kaj nepre ne en la teksta dokumento. La bildoj devas veni aparte, kun la jenaj informoj por ĉiu: klarigo de la bildo (titolo) kaj fotinto. Se vi ne estas la fotinto, ne sendu foton sen la skriba permeso de ĝia aŭtoro. Atentu: ne sendu tro da bildoj en unu mesaĝo – iuj povus malaperi survoje.
- Sendu vian kontribuon per Facebook nur kaze, ke vi tute ne povas sendi retmesaĝojn, kaj resendu ĝin se vi ne ricevas konfirmon pri la ricevo.
- Bonvolu sendi la kontribuajojn kiel eble plej frue. Ne atendu ĝis la lasta momento.
- Estu preta reagi rapide al la petoj de la redaktoroj kaj respektu la limdatojn.
- Ĉiujn materialojn oni sendu al la jena retadreso: **redakcio-ideo@googlegroups.com**.

Se vi bezonas pliajn informojn aŭ klarigojn, bonvolu kontakti nin per la ĉi-supra retadreso.

La bultenon **ESPERANTO EN INDONEZIO** ricevas la membroj de IEA. Por ne-membroj ĝi aĉeteblas ĉe la redakcio de IEA (redakcio-ideo@googlegroups.com)

kontraŭ 1 €/ekz. aŭ Rp 12.000,00 + efektivaj sendokostoj.

Donacantoj al la indonezia Esperanto-movado ricevas ĝin elektronike kaj laŭpete ankaŭ papere.

ESPERANTO EN INDONEZIO adalah sebuah buletin bebas untuk esperantis Indonesia dan kawan-kawan. Tim sukarelawan mengerjakannya dan buletin ini dapat terbit berkat para kontributor dalam dan luar negeri serta para donatur yang dermawan. Baik tim redaksi maupun kontributor tidak menerima kompensasi apapun atas kerja mereka. Siapa pun dapat berkontribusi, asalkan selaras dengan tujuan buletin ini.

Agar buletin tercipta sebaik-baiknya dan untuk mempermudah pekerjaan redaksi, kami meminta seluruh kontributor membaca dengan teliti saran dan petunjuk berikut, dan sebisa mungkin mematuhi. Terima kasih.

- Redaksi hanya menerima tulisan dalam bahasa Esperanto dan Indonesia.
- Ada baiknya menulis tulisan singkat dalam salah satu dari dua bahasa yang disebutkan di atas, dan berikan ringkasan (maksimum 100 kata) dalam bahasa satunya lagi.
- Sebelum mengirim tulisan, sebaiknya periksalahi tulisan tersebut lebih dahulu bersama orang lain yang lebih berpengalaman. Hal itu dapat dilakukan di pertemuan Esperanto, sebagai bagian dari pembelajaran, atau secara online. Kesalahan dalam tulisan sebisa mungkin diminimalisasi dan tulisan dibuat dalam gaya bahasa yang baik.
- Mohon kirimkan tulisan dalam salah satu format berikut: **.txt**, **.rtf**, **.odt**, **.doc**. Hanya jika Anda tidak bisa mengirimnya dalam salah satu format yang telah disebutkan, gunakan format **.wpd** atau **.docx**. Jangan kirimkan tulisan dalam format **.pdf**!
- Jika Anda menggunakan 'pengganti' huruf Esperanto, gunakan format yang sama untuk seluruh dokumen.
- Gunakan hanya satu jenis huruf untuk satu dokumen.
- Jika mungkin, kirimkan juga gambar (sebisa mungkin yang berkualitas tinggi), yang sebaiknya tidak disertakan dalam dokumen teks. Gambar dikirim terpisah dari tulisan, dengan informasi untuk masing-masing gambar berupa penjelasan/judul gambar dan pembuat foto. Jika Anda bukan pembuat foto, jangan kirimkan foto tanpa izin tertulis dari pemiliknya. Perhatian: jangan mengirim terlalu banyak gambar dalam sekali pengiriman. Beberapa foto bisa saja hilang dalam proses pengiriman.
- Silahkan kirim kontribusi artikel Anda melalui Facebook, hanya ketika Anda sama sekali tak bisa mengirimnya lewat surel (e-mail), dan kirimlah pesan itu sekali lagi jika Anda tak menerima konfirmasi bahwa artikel Anda telah diterima.
- Silakan kirim kontribusi Anda sesegera mungkin. Jangan menunggu hingga tenggat waktu.
- Bersiaplah untuk bereaksi dengan cepat merespon permintaan redaksi dan mematuhi batas waktu.
- Kirimkan seluruh materi ke alamat berikut: **redakcio-ideo@googlegroups.com**.

Jika Anda memerlukan lebih banyak informasi dan penjelasan, silakan hubungi kami melalui alamat e-mail di atas.